

IIPR

INTERNACIA PEDAGOGIA REVUO

Driemaandelijks tijdschrift
Afgiftekantoor: Antwerpen X. ISSN 1013-2031

Jarkolekto 33 - trimonata
03/1

Redaktoro:

Jozefo Németh

Vicredaktoro:

Katalin Kováts

Kunlaborantoj:

Boo Mee Kim-Lindblom


Mauro La Torre

Bill Maxey

Sophia Mensen

Luiza Oberrauch Madella

Radojica Petrović



ilei

Organo de Internacia Ligo
de Esperantistaj Instruistoj

NASK 2002

ENHAVO

Maŭro LA TORRE: <i>Ĉu ni riskas malaperi?</i>	1
Radojica PETROVIĆ: <i>Instrukapbligo kaj plilertigado de E-instruistoj</i>	3
Wil VAN GANSWIJK-VLASBLOM: <i>Instrui Esperanton pere de interreto</i>	10
Viktoro GULENKO: <i>Motivoj kaj filozofioj de la 16 tipoj (socioniko)</i>	15
El la landoj kaj sekcioj (AR, BR, GB, FR, DE, HU, MX, NL, PL, RO, RU).....	22
El nia por via lerniloteko (Sylvain LELARGE)	29
<i>Kvazaŭ-nekrologo pri Zsuzsa Csiszár</i> (Renato CORSETTI)	31
Pri aranĝoj	32
<i>Nord-Amerika Somera Kursaro (NASK) en Usono</i>	32
<i>Somera E-Lernejo en Ĉaĉak, Jugoslavio</i> (aliĝilo).....	34
<i>36-a ILEI-Konferenco en Örestrand, Svedio</i> (mendilo).....	35
<i>Redaktora postnoto</i>	36

Kovrilpaĝe: School for International Training iĝis en 2002 la nova loko por NASK en Usono. La klasanoj diskutas kun instruistino Ilona Koutny pri la rolo de gestoj en interkultura komunikado. (vd. p. 32.)

ESTRARO DE LA LIGO

- Prezidanto:** Maŭro La Torre, Dipartimento di Scienze dell'Educazione, Università Roma Tre, Via Castro Pretorio, 20, IT-00185 Roma, Italio.
Tel. (+39) 06 44 62 092 aŭ 06 49 57 805, fakso: (+39) 06 49385673.
<latorre.mauro@uniroma3.it>; <http://il.uniroma3.it>
Kunordigado, rilatoj kun E-organizoj.
- Vicprezidanto:** Stefan MacGill, Pannonia u. 30 / I / 6, HU-1136 Budapest.
Tel. (+36 1) 349-5207 <stefan.macgill@galamb.net>
Eldona agado (inkl. periodaĵojn).
- Sekretario:** Agneta Emanuelsson, Carl Ugglas v6, SE-641 37 Katrineholm, Svedio. Tel. (+46 150) 52387 kaj (+46) 708152387 (mesaĝoj).
<agneta.emmanuelsson@liberal.se>
Membraro, sekcioj, komitato.
- Vicsekretario:** (*vakas!*)
- Estrarano pri financoj:** Boo Mee Kim-Lindblom, Stenbockensgata 102, SE-136 62 Haninge. Tel./fakso: (+46 8) 777 4175,
<boomee.kimlindblom@swipnet.se>
- Estrarano:** Radojica Petrović, Bul. oslobodjenja 36/14, YU-32000 Ĉaĉak, Jugoslavio. Tel. (+381) 32 371053, (oficeja) (+381 32) 302738. Fakso: (+381 32) 342101 <radp@ptt.yu>
Lerneĵaj projektoj, universitata agado.

Maŭro La Torre:

Ĉu ni riskas malaperi?

La etoso de la jarŝanĝaj tagoj nature favoras la bilancojn personajn kaj organizajn.

Se temas pri nia ILEI, sincere kaj realisme, ni ne povas esti kontentaj pri la situacio.

Sufiĉu kelkaj jenaj mencioj.

– Ni havas dekojn da Landaj Sekcioj, kiuj bezonas subtenon kaj relanĉon, kiel ankaŭ plurajn lokajn situaciojn, kie oni volus fondi novajn sekciojn, malgraŭ la malfaciloj, precipe financaj. Fronte al tio ni konstante ne havas funkciantan sekretarion, kiu flegu la diversajn rilatojn, helpu superi la barojn, eĉ voĉdonigu la Komitaton por aprobi la atendantajn kandidatajn novajn Sekciojn.

– Ni havas lerneĵaran projekton pri Interkultura Edukado helpe de la Internacia Lingvo, kiu vekas la intereson de multaj neesperantistaj kolegoj kaj lernejestroj. Por ĝi ni havus partoprenemajn klasojn kaj instruistojn, ni sukcesis – kunlabore kun TEJO – kunmeti laborteamojn por rekonstrui la Interretan medion (la "virtualan lernejon"), ni havus ambiciajn subprojektojn por edukscienca plivalorigo kaj diskonigo de la sistemo, sed – inter centoj de E-instruistoj – ni ne sukcesas trovi eĉ unu, kiu volas surpreni la taskon, kunordigi la partoprenantajn instruistojn kaj sekretarie subteni la varbadon de novaj lernejoj.

– Laŭtradicie ĉiujare ni aranĝas internaciajn konferencojn, por kolekti en unu lokon (kutime samlande kun la Universala Kongreso) la interesatojn kaj fakulojn pri instruado de (kaj per) Esperanto. Tamen jam de pli ol unu jaro ni ne havas estraran respondeculon pri la aranĝo de niaj konferencoj, tiel ke ĉi-jare en Brazilo ni devis rezigni pri la tradicia okazigo.

– Ĉiam pli multaj el niaj Landaj Sekcioj havas potencialajn membrojn, kiuj ne povas laŭstatute aliĝi je la internacia ILEI, pro la malfacilo pagi kotizon, kiu estas troa rilate la enlandan instruistan salajron. Kion fari? Ĉu rezigni pri geografie konsiderinda parto de nia ebla membraro (E-parolantaj instruuloj)? Ĉu adapti nian Statuton al la cirkonstancoj, enkondukante novajn membrokategoriojn ("asociaj membroj" kun simbola kotizo)? Ĉu tute rezigni pri la modelo de asocio kun membroj,

kaj ĝi nura agentejo, liveranta iajn servojn (page aŭ senpage)? Ĉu tute malaperi kiel organizita E-instruistaro?



Bonŝance io ankoraŭ funkcias en nia organizo.

Niaj du periodaĵoj (*Internacia Pedagogia Revuo* por niaj membroj, kaj *Juna Amiko*, por la komencantaj lernejoj kaj kursanoj) regule aperas kun interesa kaj varia enhavo.

La administrado de kotizoj kaj la librotenado de niaj apenaŭaj financoj kontentige fluas.

Je landa aŭ regiona nivelo kelkaj Sekcioj regule kunvenigas siajn anojn, aranĝante por ili ankaŭ instrutajn seminariojn, kaj/aŭ dumjare kunligas ilin per propra bulteno.

En kelkaj landoj (sed ne ĉie) la ILEI-sekcioj vere kunordigas la instruadon de Esperanto en la lernejoj, universitatoj kaj en la klubaj kursoj.

Ie la agado de UEA-LA-oj, ILEI-Sekcioj, E-Institutoj, Internaciaj Kurs-ejoj kaj E-Kulturejoj kontentige kunordigas.

Kelkie, la E-instruistoj eĉ bone rilatas kun siaj landaj instru-instancoj aŭ instruist-profesiaj asocioj.

Sed ĉu ĝenerale ni kontentu pri la situacio de E-instruado kaj pri la organizeco de ILEI?

Bonvolu sincere kaj senhezite esprimiĝi pri la supre menciitaj problemoj, proponante viajn solvojn kaj vidpunktojn.

Kion ni antaŭe pli bonu, kien ni koncentru niajn strebojn?

Kiu, kiukampe volas kaj povas kunlabori por pozitive evoluigi nian bazan strukturon kaj eksteran bildon?

Esperante ke la supra bildo ne malŝveligis vian movadan entuziasmon, ni deziras – male – provoke kaj defie veki pozitivajn reagojn kaj pasiojn.

Deziri al vi pli bonan 2003-an jaron ne malfacilas, se ni pensas pri kiom aĉa estis la 2002-a.

Pli feliĉan novan jaron!

Maŭro La Torre,
2002.12.28

Radojica Petrović:

Instrukapablo kaj plilertigado de E-instruistoj

Resumo: Edukado kaj plilertigado de E-edukantoj estas grava kondiĉo por disvastigo kaj plisukcesigo de instruado de Esperanto kiel rimedo de evoluo kaj pluekzisto de la Esperanto-komunumo, kaj ĝi estas unu el la prioritataj agadkampoj de ILEI. Ĉi tiu artikolo analizas bezonojn, celojn, celmodelon, celatojn, programon kaj efektivegeblon de instru-kapablo kaj plilertigado de instruistoj kaj instruantoj de Esperanto.

ENKONDUKO

ILEI laŭdifine okupiĝas pri E-instruado kaj zorgas pri fakaj kaj profesiaj bezonoj de esperantistaj instruistoj kaj instruantoj. Instrukapablo kaj plilertigado estas unu el la plej gravaj bezonoj, pri kiu ILEI okupiĝis ĉefe en la teoria sfero, sed praktikaj agoj estas tre bezonataj tiukampe. La komitato de UEA en Telavivo 2000 kaj la Komitato de ILEI en Lovrano 2001 aprobis la Regularon pri Ekzamenoj pri Instrukapablo, sed ĝis nun okazis eĉ ne unu ekzameno de UEA/ILEI pri instrukapablo, nek la Internacia Ekzamen-Komisiono havas konkretajn planojn pri ĝi. La Strategia Plano de UEA emfazas, interalie, la instruadon de Esperanto kaj plialtigon de profesieco en tiu kaj aliaj agadkampoj. Tiusence ankaŭ ILEI kiel kontrakta partnero de UEA en la eduka kampo havas certajn taskojn kaj apogon de UEA.

La celo de ĉi tiu artikolo estas resumi la aktualan traktadon de ĉi tiu temo en la rondo de UEA kaj ILEI, kaj analizi la eblecon de transiro el la teoria sfero al la tereno de praktika agado.

BEZONOJ KAJ CELOJ

La instruado de Esperanto daŭre estas pli amasa ekster la lernejoj ol ene. La oferto de E-kursoj renkontas la konkurencon oferton de aliaj fremdlingvaj kursoj, kun rigore kvalifikitaj instruistoj, rigore profesiaj instrumaterialoj kaj instrumedio, kaj kun pli klaraj perspektivoj de praktika uzeblo de lernota lingvo. Tiun malavantaĝon de la instruoferto de Esperanto ne povas rekompenci ĝiaj facileco kaj idea beleco nek la

malmultekostaj aŭ eĉ senpagaj kursoj. Necesas plenumi la kvalitpostulojn de moderna lingvoinstruado kaj adaptiĝi al deziroj kaj bezonoj de la moderna homo. Tio ne eblas sen kvalifikitaj kaj bone trejnitaj instruistoj kaj altkvalitaj lerniloj. La problemo de manko de kompetentaj E-instruistoj de Esperanto kun adekvata diplomo fariĝas eĉ pli akra se aperas ŝanco oficialigi la instruadon de Esperanto en lernejoj. Tiam edukinstancoj kaj lernejestraro postulas kompetentan instruiston kun formala pruvo de la kompetenteco. Jen profesiaj bezonoj de esperantistaj instruistoj kiujn ILEI devas prizorgi.

Ĝenerale, la celo de Esperanto-komunumo en la eduka kampo estas **plivastigo kaj pliuscesigo de Esperanto-instruado por produkti aktivajn esperantistojn - lingvouzantojn, organizantojn, gvidantojn, instruantojn kaj kulturkreantojn**. Ĝi plenumebblas per:

- a) Plialtigo de la nombro de edukitaj, kapablaj kaj plilertigataj E-instruistoj kaj kursgvidantoj;
- b) Plialtigo de la kvalito de E-instruado (programoj, instruantoj, lerniloj, instruformoj, ekzamenoj);
- c) Adekvata traktado de E-kulturo en instruprogramoj, lerniloj kaj kursoj ĉiunivelaj kaj ĉiuspecaj.

Por atingi ĉi tiujn celojn necesas:

- 1) Difini programon de instrukapbligo kaj difini kriteriojn por agnoski la instrukapblon;
- 2) Organizati trejnseminariojn kaj aliajn ĉeestajn kaj malĉeestajn formojn de instrukapbligo kaj plilertigado kun necesa didaktika materialo;
- 3) Difini programojn kaj kriteriojn por ekzamenoj pri instrukapablo kaj organizati la ekzamenojn.

CELATOJ

Estas diversaj terminoj uzataj kaj uzablaj por la homoj kiuj instruas E-on. Instruisto de Esperanto estas esperantisto kiu profesie instruas E-on, edukita, trejnita kaj plenumanta aliajn kondiĉojn por tiu okupiĝo. Instruanto de Esperanto estas esperantisto kiu aktuale instruas E-on, sed ne nepre profesie, kaj ne nepre kvalifikite por la instruista profesio.

Kursgvidantoj estas porokazaj kaj laŭbezonaj instruantoj en E-kursoj, praktike kun diversaj gradoj de kompetenteco, kiuj transprenas tiun rolon laŭ propra emo. Iuj asertas, ke neprofesiaj instruantoj sen aparta metodika trejniĝo povas esti pli sukcesaj produktante per siaj vervo kaj talento pli da novaj esperantistoj ol profesiaj kaj didaktike kompetentaj instruistoj de Esperanto. Tio povas okazi, sed ne estas regulo. Por konkurenci al ofertoj de instruado de aliaj fremdaj lingvoj, Esperanto devas havi same kompetentajn instruistojn kiel la aliaj lingvoj. Tamen, talentaj kaj lingve kompetentaj neprofesiaj instruantoj restas la plej amasa plenumforto de E-instruado kaj do meritas atenton kaj subtenon.

Celmodelo de instruisto de Esperanto povas esti priskribita jene:

La instruisto de Esperanto estas lingve kompetenta homo kun pedagogiaj kapabloj kaj lerto. Li aŭ ŝi (en plua teksto *li*) posedas diplomon pri edukiĝo minimume de la nivelo postulata por la instruista profesio en la lando kie li instruas. Li komprenas la problemojn kaj komunikajn bezonojn de multlingva kaj plurkultura medio, konas la historion de planlingvaj provoj, komprenas la historiajn kaj sociajn cirkonstancojn de ekesto de Esperanto, konas la Esperantan kulturon kaj kapablas ekspliki la rolon kaj eblojn de la internacia lingvo kaj E-komunumo. Li konas kaj komprenas la sciencajn konsiderojn de la fenomeno de lingvo kaj lingva komunikado, la bazajn konceptojn de inform- kaj komunikteorioj, kaj la psikologiajn kaj fiziologiajn aspektojn de la lernado kaj precipe lingvolernado. Li aktive uzas Esperanton kaj regas ĝin minimume laŭ kriterioj de la meza internacia ekzameno de UEA/ILEI. Li konas la ĝeneralajn didaktikajn principojn kaj instruformojn, kaj kapablas apliki ilin al sia lingvoinstrua laboro. Li konas la celojn de lingvoinstruado ĝenerale kaj Esperanto-instruado speciale, kaj scipovas plani, organizi kaj prepari instrumaterialon kaj instrurimedojn. Li konas la historian evoluon kaj modernajn tendencojn de lingvoinstrua metodologio, kaj kapablas elekti kaj kombini adekvatajn instrumentojn kaj instruteknikojn konforme al konkretaj cirkonstancoj kaj propra karaktero. Li scipovas adekvate strukturigi lecionon kaj gvidi instruhoron, krei malstreĉan kunlaboretoson kun la lernantoj, motivigi ilin al lernado kaj uzado de la lingvo kaj varbi por Esperanto-agado kaj aktiva aparteno al Esperanto-komunumo. Li estas objektiva taksanto de propra laboro kaj de progreso kaj sukceso de la lernantoj. Li pretas por plilertiĝado, sekvas la evoluon

de la lingvo Esperanto, ĝia kulturo, edukscienco kaj edukteknologio klopodante progresigi siajn labormanieron kaj instrukapablon.

La priskribita modelo ne signifas neglekton de instruantoj kiuj ne posedas la pedagogian edukitecon kaj formalan instrukapablon en tiu grado kaj tamen sukcese gvidas kursojn kaj produktas esperantistojn. La minimuma postularo kiun ili devus plenumi povas resumiĝi en lingva kompetenteco, kono de Esperanta kulturo, kapablo organizi kurson, lerte gvidi instruhoron, krei malstreĉan kunlaboretoson kun la lernantoj kaj motivigi ilin por la lernado kaj Esperanto-agado. Unusemajnaj trejnseminarioj povas grave kontribui al plilertigo de tiaj instruantoj, sed ne sufiĉas por fari ilin plene kompetentaj instruistoj.

El kia materialo povas produktiĝi instruistoj kaj instruantoj de Esperanto? Eblas difini diversajn tipojn de celatoj de la instrukapabligo kaj plilertigado.

- A. Instruistoj de aliaj lingvoj jam plenumas plimulton de la postuloj laŭ la priskribita celmodelo de instruisto de Esperanto. Por sukcesi ĉe la ekzameno de UEA/ILEI pri instrukapablo, ili devos ankoraŭ regi la lingvon, Esperanto-kulturon kaj specifaĵojn de interkultura edukado kaj Esperanto-instruado.
- B. Kompetentaj esperantistoj kiuj profesie instruas aliajn fakojn jam havas certajn pedagogiajn kaj priesperantajn scipovojn kaj relative facile fariĝas bonaj kursgvidantoj. Ili bezonas ekregi profesinivele specifaĵojn de lingvoinstruado por fariĝi agnoskitaj instruistoj de Esperanto.
- C. Kompetentaj esperantistoj kiuj ne estas profesiaj instruistoj posedas nur la Esperanto-rilatajn trajtojn de la priskribita celmodelo. La ceterajn sciojn kaj kapablojn ili povas akiri per profesinivela instrukapabligo. Sed kutime, se ili posedas organizkapablojn kaj naturan instrualenton kaj pasas intensan metodikan trejnseminaron, ili jam povas esti bonaj kursgvidantoj.
- Ĉ. Multas instruemuloj kiuj apenaŭ konas la lingvon kaj didaktikan arton, sed tamen jam gvidas kursojn kaj volas verki lernolibrojn. Ili devas unue kompreni, ke entuziasmo kaj sindonemo ne sufiĉas por fari utilon al Esperanto-movado, kaj sekve ili aliĝu al instrukapablighaj aktivajtoj. En ĉi tiu kategorio aparte gravan atenton kaj

subtenon meritas junaj novaj esperantistoj kiuj entuziasme alproprigas la ideon de internacia lingvo, pretas lerni kaj volas instrui. Investo en ilian instrukapabligon garantias gajnon en pliamasigo kaj plisukcesigo de Esperanto-instruado.

TEMARO POR LA INSTRUKAPABLIGO

Se la celo de instrukapabligo estas diplomi instruistojn de Esperanto laŭ la priskribita modelo, tiam la instruprogrameco por instrukapabligo devas kovri la sekvajn temojn:

1. Lingvistikaj teorioj kaj lingvolernado
2. La bazaj konceptoj de inform- kaj komunik-teorioj
3. Psikologiaj aspektoj de lernado
4. Sociaj kaj historiaj faktoroj de ekesto kaj pluekzisto de Esperanto. E-komunumo kaj E-kulturo.
5. Celoj kaj celatoj, organizaj formoj kaj niveloj de E-instruado
6. Instruprocezo kaj lernoprocezo, didaktikaj principoj, instruistoj, instrumetodoj kaj instruformoj
7. Instruanto (ĉu instruisto ĉu kursgvidanto) kiel faktoro de la E-instruado
8. Lernanto kiel faktoro de la E-instruado. Motivigo
9. Evoluo kaj tipologio de lingvoinstruaj metodoj
10. Lerniloj kaj instrumaterialoj. Perkomputila E-lernado.
11. E-beletro, kaj E-kulturaj temoj, situacioj kaj helpiloj en la E-instruado
12. Planado kaj programado de E-instruado
13. Planado kaj organizo de instruprocezo kaj instruhoroj. Strukturo de la lecionoj
14. La rolo de muziko, ludoj kaj aliaj maltelegajtoj dum la instruhoroj
15. Funkcioj kaj tipoj de lingvaj ekzercoj kaj lingvaj ludoj
16. Taksado de la instruprocezo kaj de la lernantoj
17. Specifaĵoj de E-instruado en diversaj nacilingvaj medioj.
18. Tipaj lingvaj eraroj. Prevento de la eraroj
19. Fonetiko kaj fonologio. Lernigo de modelaj prononco, parolritmo kaj voĉmodulado
20. Ortografio. Uzo de majuskloj kaj interpunkcioj en Esperanto. Esperantigo de personaj nomoj kaj toponimoj.

21. Leksiko kaj semantiko. Lernigo de vortoj
22. Instruo pri morfologio kaj sintakso
23. Metodologio de interkultura edukado. Interkultura edukado per E-o
24. Propedeŭtika valoro de Esperanto.

Ne ĉiuj temoj estas traktendaj kun ĉiuj tipoj de la celatoj A - Ĉ, sed nur tiuj kiuj mankas laŭ la priskribo de koncerna tipo kompare kun la celmodelo. Simile, por instrukapabligi neprofesiajn instruantojn kaj kurs-vidantojn, precipe el la celatoj C, oni povas porkomence redukti la temaron al la kernaj kaj plej necesaj teoriaj scioj kaj praktikaj kapabloj (ekzemple la temoj 5, 9, 13, 15 kaj 18), kaj poste plivastigadi laŭbezone kaj laŭŝtupe ĝis la profesia nivelo de plena instrukapabligo. La samo povas validi por la celatoj Ĉ sub kondiĉo, ke ili ellernu la lingvon mem sufiĉe bone.

FAREBLOJ

Nur kelkaj universitatoj diplomas instruistojn de Esperanto. La plej konata estas ELTE en Budapeŝto kun sia Esperanto-fako de la Katedro Ĝenerala kaj Aplikata Lingvistiko. La plej nova sukcesa klopodo tiusenca estas la Interlingvistikaj studoj ĉe la Universitato de Adam Mickiewicz en Poznań, kies programo kovras pli ol la ĉi tie listigitan temaron se studento en la tria studjaro elektas la didaktikan fakon. Menciinda estas la financa subteno de la fondaĵo ESF (Esperantic Studies Foundation) el Usono per stipendioj al kelkaj studentoj de la Interlingvistikaj studoj. ESF subvencias ankaŭ aliajn edukkampajn E-aktivaĵojn kaj povas esti grava faktoro en la evoluo de la esperantista edukscienco kaj praktiko se la esperantistoj scipovos prezenti subvenciendajn projektojn en tiu kampo.

La signifo de la universitataj E-studoj ne limiĝas al la nombro de diplomitoj, kiu fakte postrestas la bezonojn kaj ambiciojn de Esperantomovado, sed la universitata E-agado estas grava ankaŭ por la evoluo de la E-metodiko kaj la produktado de interlingvistikaj kaj metodikaj studmaterialoj precipe por la temoj kiujn ne aŭ ne bone kovras la E-metodikaj ĉefverkoj de Rakuŝa, Szerdahelyi, Szanser kaj Melnikov. Aliflanke, la universitataj E-diplomitoj estas la homforto kiu kapablas plu eduki novajn E-instruantojn en eksteruniversitataj edukformoj. La aktualaj

streboj kolekti kaj sistemigi informojn pri instruado de Esperanto en universitatoj (G. Pirlot, edukado.net) devus ebligi pli bonan kunordigadon kaj utiligadon de la rezultoj de la universitataj Esperanto-studoj.

Malpli kompletaj ol la universitataj studoj, sed pli amasaj, estas metodikaj kursoj kaj aliaj formoj de edukado kaj trejnado de E-instruantoj kiuj okazas ĉefe ĉe pluraj E-kursejoj (E-centroj kaj institutoj) kaj okaze de diversaj esperantistaj renkontiĝoj. Ilia graveco por popularigado kaj lernigado de Esperanto estas nekontestebla, kaj povus fariĝi eĉ pli granda per iom pli da kunordigado surbaze de komunaj instruprogramoj aprobotaj de la komitatoj de ILEI kaj UEA. Ekzemple, paŝon al pli kompleta instrukapabligado faras IEI per la nove anoncita plano de IEI pri duŝtupaj porinstruistaj seminarioj ne nur Cseh-metodaj.

Alian paŝon al la celmodelo de Esperanto-instruado faras la Somera Esperanto-Lernejo Ĉaĉak kun sia Metodika seminario. En la sesio kiu okazos fine de junio 2003 estos pritraktitaj ses temoj el la listigitaj 24 kaj estos fiksita plano de pluaj paŝoj: novaj seminarioj, ekzamenoj pri la instrukapablo kaj interseminaria malĉeesta laboro kun la kandidatoj. Simile povas fari ankaŭ aliaj Esperanto-kursejoj.

En ĉiuj tiuj kaj aliaj samcelaj aktivaĵoj ILEI devus plenumi sian rolon de kunordiganto kaj kunrealiganto, kaj aktivi kiel proponanto de kunlaboro kaj subtenanto de bonaj iniciatoj.

KONKLUDO

La aktivaĵoj iniciatitaj ene de UEA, ILEI kaj IEI por pli vasta kaj pli bone organizita edukado de instruistoj kaj instruantoj de Esperanto devas konverĝi al klare difinitaj celoj kaj koheraj instruprogramoj. La praktika celo estas efektiviĝi sistemon de seminarioj kaj aliaj formoj de ĉeesta kaj malĉeesta lernado kaj trejnado kun funkciaj ekzamenoj pri instrukapablo, inkluzive la universitatajn Esperanto-studojn kaj ties produktojn kaj servojn. Estas grave, ke la komitatoj de ILEI kaj UEA aprobu ĉi-koncernajn decidojn kiuj instigu malferman kaj sistemecan kunlaboron inter la agantoj sur la eduka kampo de E-komunumo.

LITERATURO

- [1] Rakuša R., Metodiko de la E-instruado, Mladinska Knjiga, Ljubljana 1970
- [2] Szerdahelyi I., Metodologio de Esperanto: Lingvoinstruado kaj parol-apropriigo, ELTE, Budapest, 1975
- [3] Szanser I., Teorio kaj praktiko de lingvo-instruado, ILEI, Budapeŝto, 1992
- [4] Melnikov A., La ĉefaj principoj de fremdlingvo-instruado ("Instruado - sen turmentado!"), 1999
- [5] <http://www.training-youth.net/tkit2/tkit2.pdf>: Methodology in Language Learning T-kit, Council of Europe, Directorate of Youth and Sport.

Radojica Petrović,

Universitato de Kragujevac, Teknika Fakultato en Čačak

Wil van Ganswijk-Vlasblom:

Instrui Esperanton pere de interreto

Tion mi faras jam dum kelkaj jaroj kaj oni petis min rakonti ion pri miaj spertoj en IPR. Eble iu el vi iom miras pri la fakto ke mi je mia aĝo (pli ol 70-jara) havas interretpaĝon kun la ebleco instrui Esperanton per ĝi. Mi klarigos kiel mi jam longe okupas min pri komputiloj.

Mia edzo estis programisto dum la lastaj dek jaroj de lia laborperiodo kaj nia filo tre interesiĝis pri informatiko. Kiam la ebleco ekestis studi tiun fakon en la teknika universitato, li tuj ŝanĝis sian studdirekton por iĝi informatika inĝeniero. Eble vi povas imagi pri kiu temo mia edzo kaj li diskutis kiam ili estis kune. Kaj mi? Mi tute ne sciis ion pri tiu temo, do estis fakte nur unu ebleco por kundiskuti, nome, mem sekvi kurson. Kaj tion mi faris. En tiu tempo antaŭ multe pli ol 10 jaroj estis la nura ebleco mem fari programojn. Mi uzis por tio tre simplan komputilon kun sonbendo kaj la lingvon Basic.

Poste venis la ebleco lerni la programojn Word Perfect, D-base, Lotus 1-2-3 k.t.p. Neniam mi sekvis kursojn kun tiom da plezuro! Duope ni sidis antaŭ komputilo, juna virino kaj mi kaj ĉio kio povas iri nebone, okazis ĉe ni. La teksto estis for, la kalkulado ne funkciis. Ni mem kompreneble kulpis pri tio, sed tamen la ĥaoso, kiun ni kaŭzis, estis motivo por ni ege ridi kaj tion ni faris multfoje. Hejme venis intertempe alia komputilo por havi la eblecon ekzerci la lernotajn taskojn.

Kiam mi iĝis 65-jara, mi ricevis de nia filo modemon, aparaton por ligi la komputilon al telefonlinio. Mi diris: "Verŝajne mi estas la sola patrino en Nederlando, kiu ricevas tian donacon je tiu aĝo" kaj mi demandis kion mi faru per ĝi? Ankoraŭ ne ekzistis interreto, almenaŭ ne por privataj personoj. Ja estis "bulletinboards" kaj mi rememoras, ke mi kelkfoje kontaktiĝis per ĝi kun esperantisto en Eindhoven, kiu estis pli sperta ol mi je tiu tereno. Mi tiam ne estis tiom kuraĝa kaj mi timis fari erarojn. Sed la tekniko evoluis kaj venis interreto. Ĝin mi povis uzi helpe de mia modemo.



La filo diris: "Panjo, vi nun mem havu hejmpaĝon" kaj li faris ĝin por mi. Hejmpaĝo kun privataj sciigoj sur interreto? La ideo fakte ne plaĉis al mi. Kion fari? Mi decidis meti la unuan lecionon de skriba E-kurso sur ĝin, pensante ke certe neniu trovos ĝin kaj se jes, verŝajne neniu emus sendi al mi la tradukojn. Sed, mi eraris. Jam post du semajnoj estis iu sinjoro, kiu volis sekvi la kurson

Do mi estis devigata daŭre meti novan lecionon sur la paĝon, por ke li povu daŭrigi la studadon, ĝis la lasta, la 21-a leciono. Kiam li estis preta, mi sendis al li same kiel poste al aliaj per interreto memfaritan atestilon...

Intertempe ankaŭ aliaj komencis sekvi la kurson, venis petoj ŝanĝi kelkajn erojn por ke ĝi estu pli taŭga por memstudado. Do mi iom renovigis la aspekton kaj enhavon.

La partoprenantoj loĝas dise en Nederlando kaj en Belgio kaj loĝis eĉ kursanino en Usono. Ĉiuj havas principe nur kontakton kun mi kaj ne kun aliaj esperantistoj. Ŝajnis al mi pli bone, ke ili havu la senton aparteni al grupo kaj pro tio mi komencis listgrupon por miaj kursanoj, ekskursanoj kaj kelkaj interesiĝantoj. Tiuj kiuj estas sur la listo povas legi kion mi skribas pri gramatiko, kunvenoj k.t.p. sed ankaŭ ili mem povas sendi mesaĝon aŭ reagon je sciigo de alia partoprenanto. Sur tiu listo nun estas 110 nomoj. La plej multajn mi ne konas persone, kelkajn mi renkontis jam ie en Esperantio.

Pri kelkaj el ili mi volas ion rakonti al vi: Unu el la unuaj kursanoj estis J. Li partoprenis, ĉar li estas kantisto kaj intencis kanti krom en la

nederlanda kaj la angla lingvoj en tria lingvo kaj li elektis por tio Esperanton. Jam post 15 lecionoj li provis traduki unu el siaj kantoj en Esperanton. Estas tre ĉarma kanto por la bebo, kiun lia edzino kaj li atendis post kelkaj monatoj. Entute li komponis 4 E-kantojn helpe de mi. Tiam li denove komencis studi kaj ne povis daŭrigi la lernadon de Esperanto.

M. estas juna virino, kiu pristudis rapide la tutan kurson kaj tuj post la fina leciono ŝi praktikis sian konon en Prago, kie ŝi ekhavis kontakton pere de Pasporta Servo. El Prago mi ricevis per retroŝto, de al mi ne konataj esperantistoj komplimenton pro ŝia kono de Esperanto.

E. estis 14-jara knabino, kiu nekredeble sed tamen vere, nur unu liberan semajnon uzis por trastudi ĉiujn 21 lecionojn. Per la listo por miaj kursanoj M. kontaktiĝis kun ŝi kaj tio rezultis en vizito de ili kune al la Malferma Tago de UEA en Roterdamo. E. skribis al mi pri tio: Kun M. mi estis en Roterdamo. Estis tre agrable tie. Iom strange aŭdi tiom da Esperanto ĉirkaŭ mi. Estis bone aŭdi la ĝustan prononcadon. Ni renkontis aliajn gejunulojn, anojn de NEJ. Mi nun havas ankoraŭ pli da emo daŭrigi la studadon de Esperanto. Antaŭnelonge ŝi verkis kelkajn poemojn en Esperanto.

Ankaŭ la tiam 17-jara frato de E. entuziasmiĝis pri la lingvo kaj li petis mian permeson traduki la nederlandan kurson al la angla lingvo. Pro tio nun estas lernejo en Usono, kie instruistino instruas Esperanton al grupo da lernantoj per mia tradukita interretkurso.

E. kaj ŝian fraton mi renkontis en Roterdamo dum alia Malferma Tago de UEA. Ĉar ili sciis kiam mia trajno alvenos, ili estis je la stacidomo por bonvenigi min, kvankam ni neniam antaŭe persone konatiĝis. Estis tre kortuŝe renkonti ilin tie. Ili nun estas aktivaj membroj de la Junulara Esperanto Klubo en Nederlando.

Kio estas la aĝo de la kursanoj? Ĝi estas tre varia. La plej juna kiu sendis la unuan lecionon kune kun la patro estis 12-jara. La plej aĝan mi taksas ĉirkaŭ sepdek-jara. Estas viroj kaj virinoj, knaboj kaj knabinoj, studentoj kaj personoj kiuj ne plu studas.

Estas rimarkinde, ke meznombre la kursanoj ne faras multajn erarojn kaj kelkaj tre rapide progresas. K. ensendis la unuan tradukon al mi la 6-an de januaro 2002 kaj li finis la kurson jam la 4-an de februaro, daŭrigis la studadon per la E-lernolibro de Zondervan kaj Manders, kiun li finstudis inkluzive la ekzamentaskojn la 30-an de aprilo. Li iĝis membro de nia E-klubo en Groningen en kies ĉirkaŭaĵo li loĝas. Li jam prelegis kaj entuziasmigiis sian fratinon lerni Esperanton.

Je mia peto sur la listo skribi al mi ion pri la motivoj por sekvi E-kurson, venis diversaj reagoj:

M. skribis: Scivolemo. Mi aŭdis pri Esperanto kiam mi estis 10-jara. Tiam jam la ideo allogis min. Nun mi estas 27-jara kaj legis intervjuon pri Esperanto en loka gazeto kaj pro tio mi entuziasmiĝis denove kaj mi trovis vian kurson en interreto. La studo de Esperanto donis al mi: novajn geamikojn, mian veran amikon, agrablajn vojaĝojn al Italio, Francio, Ĉeĥio, Belgio kaj Germanio. Pli rapidan komprenon de aliaj lingvoj, semajnfinojn kun multe da muziko, dancoj, interesaj prelegoj kaj diskutoj pri diversaj temoj kaj pozitivan senton, ĉar mi scias novan lingvon kaj povas uzi ĝin.

S. skribis: Esperanto estis por mi fakte eraro, ĉar mi supozis, ke estis la hispana. Avantaĝo de Esperanto estas ke oni povas mondscale inter-komunikiĝi, ekzemple ankaŭ kun rusoj kaj ĉinoj.

M. skribis: Jam de mia juneco la lingvo-diverseco tiklas mian atenton. Esperanto montriĝas esti la plej vastiĝinta artefarita lingvo. Kiam mi trovis vian kurson, mi decidis sekvi ĝin. Eblas trastudi ĝin en tri monatoj, ĉu ne? Li bezonis malpli ol 2 monatojn!

A. skribis: Miaj motivoj estis: hazardo/ mia karaktero/ idealismo/ fantazio/ plezuro kaj praktika avantaĝo, mi nome estas ĵurnalisto.

M. skribis: Iomete hazarde mi komencis, mi havis iom da libera tempo, sed lernante mi iĝis preskaŭ sklavo de ĉi tiu ludado kun lingvo! Esperanto iĝis por mi vere viva, kiam mi partoprenis en studsemajnfino en Bergen ĉe la maro. Tre speciala sperto, kiun mi povas rekomendi al ĉiuj komencantoj!

K. skribis: Onklo mia iam studis Esperanton. Tion mi rememoris, kiam mi vidis Esperanton sur interreto. Dum mi estas lernanta ĝin mi opinias, ke ĝi similas streĉan libron; ĉiu paĝo provokas turni ĝin.

Aliaj skribis pli mallonge: enuo/ intereso en lingvoj/ mia edzino estas esperantistino/ la ricevo de malnova E-studlibro/ artikolo pri la iama malgranda ŝtato Moresnet, kie Esperanto fakte estis la oficiala lingvo. Laste ankoraŭ du opiniojn rilate al la E-retkurso: F. skribis: Mi hodiaŭ finis la kurson kaj ĉar mi timas ke sen kontaktoj en Esperantio rapide forflugos mia kono mi tuj aliĝos al la Unuiĝo Esperanto Nederland.

Fine ankoraŭfoje K.: Ju pli longe mi okupas min pri Esperanto, des pli multe kreskas la admiro pri ĉiaj aspektoj de la lingvo: mi admiras la elegantan simplecon kaj belecon, same kiel la geniecon de la farinto. Apenaŭ kredebla estas la fakto, ke Esperanto estas artefarita lingvo!

Kiel funkcias la kurso?

Vi jam komprenis, ke oni povas trovi ĝin sur interreto. Sub ĉiu leciono estas traduktaskoj: Esperanto al la nederlanda kaj inverse. La tradukitajn frazojn la kursanoj sendas al mi per retpoŝto. Kiel eble plej rapide, kelkfoje jam post dek minutoj, certe ne daŭros pli longe ol tagnokto, mi resendas la korektitajn frazojn. La frazojn sen eraroj mi ne resendas kaj erarojn mi korektas sub la frazo kun aŭ sen komentario. Regule montriĝas ke ekestas ligo inter la kursano kaj mi, kvankam ni neniam vere renkontis unu la alian. Post nelonge mi elprovas alian sistemon, nome per memkorektado. Mi ege esperas ke mia laboro montriĝos fruktodona por la kursanoj kaj por la Esperanto-movado.

Wil van Ganswijk-Vlasblom

Superrigardo ekde novembro 1998:

168 personoj sendis la tradukojn de la unua leciono, lastjare pli ol en la komenco! 35 el ili atingis la finon de la kurso 79 sendis nur la unuan aŭ la unuan plus la duan lecionojn 54 pli aŭ malpli aktivis ankoraŭ. Inter aprilo 2000 kaj julio 2002 vizitis 7190 personoj mian E-paĝon.

Adresoj de la Esperanto-paĝoj:

<http://www.xs4all.nl/~wvganswk/> - hejmpaĝo

<http://esperantocursus.TK> - informoj

<http://esperanto-cursus.TK> - la kurso

Retadreso de la aŭtoro: <wvganswk@xs4all.nl>

Viktoro Gulenko:

Motivoj kaj filozofioj de la 16 tipoj Kiel ili aplikeblas en pedagogia praktiko?

(Kievo, 1991 – reduktita versio).

Tradukis Dmitrio Lytov <socion@hotbox.ru>

kaj Aleksandro Galkin <fafaw@yandex.ru>.

En la numero 3/2002 ni rakontis al vi pri la **socioniko** – la teorio de reciproka interligo inter homaj talentoj kaj iliaj rilatoj [3]. Ni koncize rakontis pri 16 **sociotipoj** kaj pri apliko de la socioniko en pedagogio. Nun ni disvolvos la temon plu. Plenajn priskribojn de la 16 sociotipoj, iliajn portretojn kaj pluan informon oni povas trovi sur la retpaĝaro <http://socioniko.hotbox.ru> aŭ <http://socioniko.narod.ru>

1. Diversaj tipoj, diversaj motivoj, instigoj.

Por ke oni povu motivigi lernantojn al sorbo de ideoj, al fervoro pri lernado, oni devas kompreni iliajn motivojn. La diferenco de motivoj ofte estas kaŭzata de la personaj tipoj.

La ideo de “motivo” estas duflanka. Unuflanke, oni trovas motivojn en la esenco de plenumota laboro mem, kiu donas la eblecon riveli siajn fortajn kapablojn. Aliflanke, oni estas instigata ankaŭ fare de la estonta rezulto de sia laboro, se ĝi estas sufiĉe grava. En mia artikolo mi uzos la unuan flankon de ĉi tiu ideo. Oni povas distribui la 16 tipojn je 4 grupoj de instigoj, kies membroj havas similajn motivojn. Tiuj grupoj estas plenigataj laŭ du kriterioj (vi jam legis pri ili en la antaŭa artikolo [3], rigardu ankaŭ la **Tabelon 2**): ekstravertuloj/introvertuloj kaj sensuloj/intuiciuloj.

Tabelo 1. Motivoj, instigoj de sociotipoj.

	Ekstravertuloj	Introvertuloj
Sensuloj	PRESTIĜO: Administrulo, Bonvivulo, Militulo, Politikulo	BONSTATO: Inspektulo, Gardulo, Majstrulo, Perulo
Intuiciuloj	UNIKECO: Entreprenulo, Mentorulo, Serĉulo, Psikologulo	SIN-VALORO: Justigulo, Konfespenulo, Kritikulo, Lirikulo

Sensaj ekstravertuloj. Ili bone demonstras sin en la *praktika agado kun kreskantaj kontaktoj*. Ili estas stimulataj per **PRESTIĜO**: grava pozicio en la socio, sukcesa kariero, potenco kaj influo, atento kaj respekto de aliuloj. Kiel atestas pedagogia praktiko – nia [1] kaj de la usonaj psikologoj [2] – ĉi tiuj sociotipoj tre ofte plejofas en multaj lerngrupoj. Preskaŭ duono de ĉefoj de oficejoj, organizoj kaj grandaj firmaoj apartenas ĝuste al ĉi tiu stimulgrupo. Kiam oni instruas al la klaso, kie plejofas ĉi tiuj tipoj, oni devas evitadi tro teoriajn kaj “laŭlibrajn” sciojn, alproksimigi la instruadon al la socia praktiko, uzadi multajn impresajn ekzemplojn kaj praktikajn testojn, kaj neniam forgesi rimarkigi la sukcesojn de la lernantoj.

Sensaj introvertuloj. Ili sukcese demonstras sin en *praktika agado kun stabilaj kontaktoj*. Ili estas stimulataj per **BONSTATO**: bona materia bazo, certeco pri la estonteco, ordo kaj komfortaj kondiĉoj de la vivo kaj laboro. Kvanto de ĉi tiuj sociotipoj en lernejoj klasoj kutime okupas la duan lokon – malpli ol la sensaj ekstravertuloj, sed pli ol la intuiciaj ekstravertuloj aŭ introvertuloj. Ili formas kvazaŭ la “fundamenton” de la grupo aŭ klaso. En la socio sensaj introvertuloj formas la tiel nomatan “mezan klason” (middle class) – socian bazon de iu ajn prospera ŝtato. Se ili sentas sin bone, do la socio ankaŭ disvolviĝas stabile, sen revolucioj aŭ ekstremismo. Kiam instruisto instruas al ĉi tiuj tipoj, li devas doni precipan atenton al la aplika flanko de la instruado, profesiismo kaj kvalito de la transdonataj scioj kaj scipovoj.

Intuiciaj ekstravertuloj. Ili sukcese demonstras sin en la *netradiciaj aŭ konstante ĝisdatigataj sferoj de agado kun kreskantaj kontaktoj*. Ili estas stimulataj per **UNIKECO**: neordinareco, perspektivo de tasko, ĝia intelekta komplikeco kaj pasiigeo, per grandaj, “tutmondaj” rezultoj de proponataj projektoj. Kutime iom de ĉi tiuj sociotipoj okupas la trian ŝtupon, sed ilia sinkonduto maltrankviligas la instruiston ofte eĉ pli ol sinkonduto de la sensuloj – per ilia “malŝabloneco”, “nekutimeco”, per ilia deziro transiri limojn de la kutimiĝo, ordinareco. Ĉi tiu grupo de la sociotipoj donas al la socio plimulton da intelektaj avanuloj de la epoko – eltrovintoj, fondintoj de novaj sciencoj (logikuloj) aŭ kredsistemoj (etikuloj), ideaj inspirantoj de novnaskiĝantaj tendencoj de socia penso. Kiam instruisto laboras kun intuiciaj ekstravertuloj, li devas neniam

samniveligi ilin, neniam malakceli iliajn serĉojn, ĉiam doni al ili la oportunecon eldiri siajn teoriojn kaj eĉ disputi kun la instruisto.

Intuiciaj introvertuloj. Ili sukcese demonstras sin en la *netradiciaj aŭ konstante ĝisdatigataj sferoj de agado kun stabilaj, neŝanĝemaj kontaktoj*. Ili estas stimulataj per **SIN-VALORO**, t.e. ebleco esplori kaj fari tion, kio estas grava por ili, laŭ la horaro, kutima al ili. Ilia interna mondo de ideoj plej gravas por ili, determinas iliajn celojn. Tiam taskoj, kiujn ili ricevas de la instruisto, devas nepre kongrui kun ilia specifo: metodoj de laboro, kredo ktp. Kvankam la intuiciaj ekstravertuloj donas al la socio intelektajn avanulojn, la intuiciaj introvertuloj donas geniulojn (tiam ĉi-grupo estas la malplej kvanta). Tiam mi konsilas al instruistoj – bonvolu permesi al ili fari tion, kion ili opinias interesa. Instigoj de prestiĝo, potenco, bonstato kaj eĉ prioritato kaj intelekta avaneco negrave influas ilin – preskaŭ ĉiam la intuiciaj introvertuloj distingiĝas per modesteco kaj nepretendemo.

Se oni konas la instigojn/motivojn – oni povos trovi necesan metodon de la instruado, korekte distribui taskojn inter la lernantoj laŭ iliaj kapabloj kaj interesoj.

2. Filozofioj de 16 tipoj.

La problemoj de la instigoj interligiĝas kun la problemoj de la vivaj motivoj – pli profunda kaj abstrakta kategorio. Mi, kiel reprezentanto de la intuicia sociotipo, klopodas ne preteratenti la “idean” flankon de la problemoj. Ĉiu sociotipo havas siajn ideojn pri tio, kio direktas la mondon kaj la homaron – alivorte, sian filozofion. Unu el la plej gravaj filozofiaj problemoj estas la problemoj de la materio kaj ideo: kiu estas la plej grava?

Mi nomos *materiistoj* la tipojn, kies instigoj kaj motivoj estas precipe materiaj, t.e. la 8 *sensuloj* (t.e. la *sensaj tipoj*). La intuiciaj tipoj, aliflanke, nomiĝos *ideistoj*, ĉar ili motiviĝas precipe per ideoj (rigardu la Tabelon 2).

Atentu! Bonvolu ne kompreni min tro laŭvorte: mondaj filozofiaj kaj ideologiaj sistemoj ofte ne kongruas kun la individuaj sistemoj de stimuloj. Certe, mi nur simpligas la socionikan teorion por vi, kaj tiamaniere faciligas la komprenon.

2.1. Objektivaj ideistoj (intuiciaj ekstravertuloj).

Mentorulo: la mondo direktatas per fato, providenco. Li estas la plej mistikema aŭ religiema sociotipo, kiu ofte sincere kredas pri sia "elektiteco", certas, ke li estas predikanto de la Diaj, kosmaj aŭ aliaj supernaturaj fortoj.

Serĉulo: la mondo direktatas per tutmonda racio, intelekto. Ĉi tiu sociotipo kredas pli ol la aliaj la eblecon de ekkono de la plej komplikaj fenomenoj, la racian strukturon de la objektiva mondo, ĝian kompreneblecon per ĝustaj logikaj principoj ("Dio ne ludas ĵetkubojn" - Einstein).

Psikologulo: la mondo direktatas per la sento, kiu estas pli forta ol la persono mem; li estas la plej altruisma personeca tipo, kiu povas helpi homojn, eĉ ne postulante dankon rekompence. Tio ankaŭ klarigas lian fortan emon al la kompato.

Entreprenulo: Viva Naturo kreas ĉion. Ĉi tiu sociotipo "animigas" materiajn fortojn de la naturo, kaj tiam povas esti nomata "idea materiisto".

2.2. Subjektivaj ideistoj (intuiciaj introvertuloj).

Justigulo: la mondo direktatas per la penso ("Mi pensas, do mi estas" – Descartes). Se oni komprenos, kiaj sistemaj leĝoj direktas la socion, tiam la socio povas esti justa. Li estas la plej logika sociotipo, kiu opinias, ke iu ajn fenomeno determiniĝas per la universalaj ideoj (arketipoj, ejdosoj, aprioraj kategorioj) kaj iliaj interligoj.

Kritikulo: la mondo direktatas per la ŝanco. Malsimile al Justigulo, li kredas, ke la objektivaj leĝoj praktike ne ekzistas, ĉio estas relativa kaj determiniĝas per la probableco. Li estas la plej ema al agnostikismo ("Mi scias nur, ke mi scias nenion" - Sokrates). Ekscio estas ebla nur dank' al la kondiĉo de la plena ena klareco kaj trankvileco, kion oni povas atingi per meditado.

Lirikulo: la mondo direktatas per humoro, kondiĉo. Li estas la plej ŝanĝiĝema psikologia tipo, kiu tre dependas de sia interna humoro. Nur tiam oni facile povas konvinki lin pri multaj aĵoj, se oni sufiĉe persistos. Tamen li ankaŭ facile abdikas la altruditajn ideojn.

Konfesprenulo: la mondo direktatas per bonkoreco. Ili estas la plej kompatema sociotipo, kvankam eĉ iliaj sentoj ne ĉiam realiĝas per agoj. La humana socio povas ekzisti, se ĉiuj direktatos per idealoj de la bonkoreco kaj justeco dum la tuta vivo. Sed idealoj devas naskiĝi en la animo de la homo mem, kaj esti ne altruditaj.

2.3. Objektivaj materiistoj (sensaj ekstravertuloj).

Militulo: la mondo direktatas per forto kaj potenco. Li estas la plej volforta el ĉiuj sociotipoj. Li komencas lukton nur tiam, kiam li trovas malfortecon de la oponanto, aŭ sekurigis sian avantaĝon. Oni devas kredi nur la objektivan realecon, kiun ni posedas per niaj sensoj, ĉio alia estas nur iluzio.

Politikulo: la mondo direktatas per famo, homaj rilatoj. Dum lia infaneco li faras multajn erarojn dank' al sia granda iniciato, kaj tiam kredas nur al siaj sentoj. Ĉio alia – vortoj, ideoj, konceptoj – estas nur instrumentoj de influo al la homoj.

Bonvivulo: la mondo direktatas per la ardo, impeto, pasio. Li estas la plej emocia persona tipo, kiu povas ankaŭ influigi humoron de aliuloj. Oni povas eĉ miskompreni lin esti "ideisto", ĉar li povas fari bone nur tion, kion li aprobas kaj konsideras "bona". Sed lia dependeco de la emocia stato de aliuloj estas plene materia, same kiel liaj kapabloj defendi interesojn de siaj familio kaj proksimuloj.

Administrulo: la mondo direktatas per laboro kaj faro. Li estas la plej materie pensanta sociotipo, kiu gvidas sin en siaj rezonadoj nur per faktoj kaj praktike provitaj leĝoj. Li ĉiom dependas de labora proceso, subigas siajn planojn al ĝi. Li refutas iujn ajn elpensitajn teoriojn kaj skemojn, se ili ne estas reprezentataj kiel funkcia teknologio.

2.4. Subjektivaj materiistoj (sensaj introvertuloj).

Inspektulo: la mondo direktatas per ordo kaj disciplino. Li estas ulo la plej dependanta de organizo de konkreta spaco, kiu ĉiam subiĝas al estanta sistemo. Li refutas iun ajn grandan alternativon, ĉar abdiko de konata strukturo signifas por li perdon de la grundo, nedirekteblan kaoson.

Gardulo: la mondo direktatas per moralo kaj devo. Ĉi tiu psikologia tipo kiel neniu alia dependas de siaj enaj moralaj principoj. Oni rajtas tiel konduki sin koncerne aliulojn, kiom tiuj meritas. La stabila sistemo de la rilatoj kaj moralaj valoroj devas esti gardataj kontraŭ iuj ajn eksteraj atencoj. Eĉ neatendita forta pasio povas estingiĝi per vola penado.

Perulo: la mondo direktatas per plezuro. Ĉi tiu sociotipo faras bone nur plezuran kaj ne lacigantan laboron. Li estas sufiĉe konforma, facile adaptiĝas al aliuloj, kredas, ke aliuloj volonte konsentos kun liaj interesoj, se li kreas al ili komfortan etoson kaj proponos tion, kio mankas al ili, por ke ili ankaŭ povu vivi por ilia plezuro.

Majstrulo: la mondo direktatas per la utilo. Laŭ sia filozofio li neniam faros ion neutilan, kaj ne proponos tion al la aliuloj. La principo de minimuma ago, kiu direktas la fizikon, estas ankaŭ lia propra principo. Kiel la plej teknologie pensanta persona tipo, li opinias, ke la plej grava argumento estas la alvoko al homa sobra penso.

Literaturo.

1. Gulenko V.V., Tyščenko V.P. Jung en lernejo (1997, ruse).
2. Lawrence, Gordon. People types and tiger stripes. Center for Applications of Psychological Type, Inc. Second edition, pages 39-40 (1984).
3. Lytov D.A. Socioniko: talentoj kaj rilatoj: IPR, 2002, No. 3.



La aŭtoro: **Viktoro Gulenko** (*surfote*; nask. 1957) – ukraina psikologo, publikis kelkajn librojn („Socioniko por estroj“ – 1990, „Abocoj de socioanalizo“ – multaj eldonoj, „Administrado de harmonia laborgrupo“ – 1996, „Jung en lernejo“ – 1997, „Struktura kaj funkcia socioniko“ – 1999) kaj pli ol cent artikolojn. Konsultas kaj instruas en la sferoj de infana psikologio kaj profesia preparado. Fondinto de la psikologia

skolo de *socioanalizo*. Loĝas en Kievo, Ukrainio.

Sociotipo: **Justigulo** (*logikema-intuiciiva introvertulo*).

Tabelo 2. La 16 sociotipoj. Fotografioj – laŭ E.S.Filatova, 1991 – 2002.

	Raciaj logikuloj	Raciaj etikuloj	Malraciaj logikuloj	Malraciaj etikuloj
Sensaj ekstravertuloj: PRESTIĜO (objektivaj materiistoj)	 Administrulo Logikema-sensiva ekstravertulo	 Bonvivulo Etikema-sensiva ekstravertulo	 Militulo Sensema-logikiva ekstravertulo	 Politikulo Sensema-etikiva ekstravertulo
Sensaj introvertuloj: BONSTATO (subjektivaj materiistoj)	 Inspektulo Logikema-sensiva introvertulo	 Gardulo Etikema-sensiva introvertulo	 Majstrulo Sensema-logikiva introvertulo	 Perulo Sensema-etikiva introvertulo
Intuiciaj ekstravertuloj: UNIKECO (objektivaj ideistoj)	 Entreprenulo Logikema-intuiciiva ekstravertulo	 Mentorulo Etikema-intuiciiva ekstravertulo	 Serĉulo Intuiciema-logikiva ekstravertulo	 Psikologulo Intuiciema-etikiva ekstravertulo
Intuiciaj introvertuloj: SIN-VALORO (subjektivaj ideistoj)	 Justigulo Logikema-intuiciiva introvertulo	 Konfesprentulo Etikema-intuiciiva introvertulo	 Kritikulo Intuiciema-logikiva introvertulo	 Lirikulo Intuiciema-etikiva introvertulo

el la landoj kaj sekcioj...

Argentino

Informetoj pri la E-instruado

- (1) Kurso de 12 lecionoj finiĝis la 15-an de decembro (en Urbo Rosario). Dum la jaro tie okazis tri aliaj kursoj.
- (2) Nia daŭriga jara kurso en la E-sidejo de Bonaero havis pli malpli konstante 20 gelearnantojn dum la jaro.
- (3) Nia ret-kurso (kun gvidado de D-ro M. Casartelli el Kordobo) <www.institutoesperanto.com.ar> havis centojn da aliĝintoj.
- (4) La oficialan korespondan kurson de Argentina E-Ligo prizorgis s-ino Nilda Suarez, el Rosario.
- (5) En Urbo Bariloche, Patagonio, BER, delonge funkcias jaraj kursoj de D-ro Werner Schad.
- (6) Same en urbo Neuken, kie loĝas nia ĉefdelegito.
- (7) Same en urbo Saenz Penjo – Chako - kie la Prezidanto de AEL, R. Diakonu daŭre instruadas.

RoSartor, <esperanto@fibertel.com.ar>

Brazilo

Esperanto en lernejoj

La pordoj malfermiĝas. La novaj leĝoj estas favoraj. Kaj simpatiantoj laboras en la ĝustaj lokoj. Tiaj estas la kondiĉoj nun en Maceió. Post dujara disvastigado de Esperanto en la lernejo, kie mi instruas, nun gelearnantoj petas E-kurson. Tial, mi kontaktis geamikojn, kiuj laboras en la sekretariejoj pri Edukado kaj ili pretas helpi min en la enkonduko de Esperanto kiel nedeviga lernobjekto.

Nun mi preparas projekton por prezenti ĝin al la aŭtoritatuloj. Se vi scias, pri lernejoj, kie oni instruas la internacian lingvon kaj pri leĝoj favoraj, bonvolu skribi al mi. Ĉiaj kontribuoj estas tre bonvenaj. Al tiuj, kiuj deziras fari la samon, mi povas sendi kopion de la projekto, post kiam ĝi estos preta.

Aristóphio A. Alves Filho

AAE - C.P. 396 - Maceió – AL, BR-57020-970 <ariknubxxi@ig.com.br>

Britio

Lerneja klubo serĉas kontaktojn

Lerneja Esperanto-klubo en Anglio serĉas alilandajn lernantojn por grupa korespondado. Ĝi esperas partopreni ankaŭ en "Euroscola en Esperanto" <http://e.euroscola.free.fr> en 2003. Skribu al: *Esperanto-Klubo (c/o Elizabeth Stanley), Sir Thomas Rich's School, Oakleaze, Longlevens, Gloucester, GL2 OLF, Anglio.*

Francio

E-instruado en francaj lernejoj

NdlR: Nia redakcio ricevis ampleksan tabelaron pri francaj lernejoj, kie Esperanto estas prezentata kaj/aŭ instruata. Grupo de Esperantistaj Edukistoj (GEE) redaktis tiun tabelaron laŭ la informoj resenditaj al la respondeculo dum majo 2002. La tabeloj donas informojn pri la aĝo kaj nombro de la lernantoj, nombro de horoj semajne, pedagogia materialo kaj pri nomoj de projekto, kontakto-permeso kaj instruistoj. Ili estas ne kompletaj, ĉar kelkaj kolegoj ne partoprenis la kompiladon. Pro manko de spaco jene ni listigas nur la lernejojn kaj instruistojn.

Infanlernejoj	Instruistoj
Ecole Maternelle Les 4 Vents – Martin Luther King, Rue John Kennedy 36000 Châteauroux	Maryvonne Houvriez
Ecole Maternelle J. Ferry, 30250 Sommières	Nicolas Karatzaféris

Elementaj lernejoj	Instruistoj
Ecole Louis Vignol, 13600 La Ciotat	Renée Triolle
Ecole Publique, 24210 Limeyrat	Balesta Didier Jacques Ravary
Ecole élémentaire, 315, route de Serres 06570 Saint Paul	Sandrine Menei
Ecole Jean Moulin, 2, rue d'Alexandrie 16000 Angoulême	Conde-Rey Marie-France
59650 Villeneuve d'Ascq	Michel Dechy
Ecole Bethinger Salengro Rue Salengro, 93140 Bondy	Elisabeth Barbay

Mezlernejoj	Instruistoj/Kursgvidantoj (k)
Collège Peiresc, 83000 Toulon	Renée Triolle
Collège Charles le Goffie, 22300 Lannion	Nicole Rizzoni Gabrielle Tréanton
Collège Hervé Faye 36170 St Benoist du Sault	Raurich Raymond kaj Anne (k)
Collège Ste Geneviève, Asnières	Michèle Abada Simon
Collège Molière, 1, av de Paris 59650 Villeneuve d'Ascq	Michel Déchy
Collège de St Bonnet 05500 St Bonnet en Champsaur	Monique Arnaud
Collège Fulrad Rue Fulrad, Sarreguemines	Armand Hubert
Collège L'Épine, 73470 Novalaise	Christian Garino
Collège P. Curie 128, Route de Villemonble, 93140 Bondy	Elisabeth Barbay
Collège Porte d'Anjou, 49490 Noyant	Paulette Naulet

Liceoj	Instruistoj
Lycée Bertrand de Born, 24000 Périgueū	José Manuel Soria
Lycée professionnel Simon-Lazard, Rue Jean-Jacques Kiesser, Lycée Technique Henri-Nominé, Rue M-al Foch, Lycée Collège Ste Chrétienne, Rue Ste Croix, 57200 Sarreguemines	Armand Hubert

	Instruisto
IUT: Institut Universitaire Technologique «Services et Réseau de Communications» 64, rue Creuzot, 38010 L'isle D'abeau	Guillaume Lanier (k)

Universitatoj	Instruistoj
Université Lyon III, Faculté des Langues 15, quai Claude Bernard, 69003 Lyon Kurso en 'Manufactures des Tabacs'	Paul Vincent JC Caraco
Université Lyon II Kurso en 'Bron Parilly'	Guillaume Lanier (k)

CUEEP: Centre Universitaire d'Enseignement et d'Economie permanent Campus Lille I – Sciences, 59650 Villeneuve d'Ascq	Michel Dechy
--	--------------

Germanio

Antaŭ studentoj de lingviko

Dum la unua oktobra semajno okazis ĉi-semestra rapid-kurso de E-o en la universitato de Münster (Germanio). Ĝi daŭris 5 tagojn, ĉiutage de 14h15 ĝis 18h00. Partoprenis 22 komencantoj, ĉefe studentoj de ĝenerala lingviko (pasintjare, kiam mi la unuan fojon faris tion, estis 7). Ĝis la fino de la kurso restis 19, por mi nekutima sukceso. Ni tralaboris kvar lecionojn de mia nova lern-materialo, per kiu mi iom eksperimentas kaj kiu ankoraŭ estas kompletigebla kaj polurenda.

En mia kurso mi ne prisilentis, eĉ akcentis — antaŭ studentoj de lingviko! — fojajn neregulaĵojn kaj neperfektajn ecojn de Esperanto kaj malsamajn opiniojn de E-parolantoj pri kelkaj lingveroj (naturalismo-skemismo, majuskligo, esperantigo de propraj nomoj, ktp.)

La kurso estis kompreneble senpaga (oficiala aranĝo de la universitato) kaj la atesto pri partopreno uzeblas por kalkuli unu semestran studhoron en la kadro de la studoplano...

Al la fino de la kurso mi invitis usonanon, kiu ne komprenas la germanan, kaj miaj kursanoj intervjuis lin Esperante. Li respondis per simplaj frazoj (sed ne tro simplaj) — kaj ili komprenis lin senprobleme! Mi vidis el la ekbrilantaj vizaĝoj, ke la partoprenintoj entuziasmiĝis pro tiu sukceso! Sekve oni petis min daŭrigi la kurson dum la semestro.

La daŭrigan kurson, kiu daŭros dum la tuta vintra semestro 2002/03 (2 horojn semajne), frekventas je mia surprizo 14 de la 22 partoprenintoj. Ankaŭ tiu kurso estas oficiala kaj kunkalkulatas en la studhoroj. Oni ricevas oficialan atestilon pri partopreno por pruvi la studhorojn.

Ĉar temas pri universitata kurso, mi ne bezonas konsilojn kaj instigojn, kiel peli la studentojn al Esperantujo. (Nome, tio okazis je mia ĝeno intertempe plurfoje.)

Rudolf Fischer

(Fonto: *La Ondo de Esperanto* 2002/11,
<http://ttt.esperanto.org/Ondo/97-lode.htm#97-06>)

Hungario

Esperanto antaŭ la franca!

En perfektiga kunveno por ekzamenantoj – la 23-an de novembro 2002 – reprezentanto de ITK (Perfektiga Centro Fremdlingva) raportis pri la stato de ekzamenitoj pri lingvoj en la jaro 2002. Ekzamenitaj estis 154.000 personoj pri 20 akredititaj lingvoj en 73 ekzamenejoj de 28 urboj en Hungario: en la gradoj supera (5%), meza (70%) kaj baza (25%). La plej altnombre elektitaj lingvoj estis la angla (53,1%), la germana (33,8%), la ceteraj (13,1%). La proporcio de Esperanto 11-obliĝis dum la lastaj kvin jaroj jene: 1998: 0,4; 1999: 0,6; 2000: 1,4; 2001: 2,3 kaj en 2002: 4,6. Per tiu ĉi sukceso nia Lingvo Internacia, nun en la tria loko, estas antaŭ la franca lingvo! En la jaro 2002 sume iom pli ol 7000 personoj enskribiĝis por ŝtate rekonitaj lingvoekzamenoj pri Esperanto (ni ne prisilentu: kun 59 %-a sukceso je la unua provo).

La E-instruado en Hungario – kompreneble – havas ankoraŭ multe da problemoj, tamen ni diru kun ioma fiero, ke tiu ĉi jaro estis sukcesa por nia E-movado. Estu gratulataj tiuj, kiuj kontribuis al tio.

Tibor PAPP, <db@satrax.hu>

Meksiko

Universitata Kurso en Meksiko

Profesoro Ruben Feldman Gonzalez komencis en decembro 2002 kurson de Esperanto ĉe la Universidad Autonoma de Baja California en Mexicali-Meksiko. La kurso konsistas el 18 gelernantoj, ĉiuj estas pli junaj ol 24. 11 el la gelernantoj estas junulinoj 20-jaraj.

La Vidbenda Kurso "Pasporto al la Tuta Mondo" estas uzata kun granda sukceso.

Laŭ informoj de Ruben Feldman, <rufegon@mxl.cablemas.com>

Nederlando

Seminario pri la Cseh-metodo

Inter la 1-a kaj la 3-a de novembro 2002 en la Internacia Esperanto Instituto (IEI) en Den Haag okazis A-seminario por eduko de Cseh-metodaj instruistoj. Ĝin partoprenis 12 personoj el Belgio, Germanio kaj Nederlando. La seminarigvidanto, Atilio ORELLANA ROJAS, preparis la intensan kaj varian programon. La partoprenantoj ricevis fundamentajn teoriajn sciojn pri la rektmetoda instruado: pri la historio de la metodo, biografio de Andreo Cseh kaj historio de IEI; pri la bazaj principoj, fundamentaj reguloj kaj karakterizaj ecoj de la metodo. Dum la lecionoj li akcentis la ecojn de Cseh-

instruisto - ne nur la profesiajn ecojn, sed ankaŭ la ĝeneralan konduton, eĉ la vestaĵojn en la leciona tempo. Tre grandan atenton Atilio donis por la instruhelpiloj: la skribtabulo, bildoj, kasedoj, videofilmoj k.a. Ankaŭ diversaj ludiloj estas bonaj helpantoj dum la lecionoj laŭ la rekta metodo, ĉar ili helpas ne nur pli facile ellerni novajn vortojn, sed ankaŭ klarigi kaj varii la lecionan programon.

Laŭ la seminaria programo okazis diskutoj pri la rolo de la kantoj kaj ludoj en la instrua procedo, pri la lernolibroj, la teknikeroj de la prezentado (demandoj, gestoj, anstataŭigoj, kontrastigoj k.s.). Okazis ankaŭ vigla diskuto pri la plej oftaj eraroj kaj la maniero por korekti, konsilinda por Cseh-metoda instruisto.

Fine de la seminario okazis la provleciono, en kiu la partoprenantoj plenumis la hejman taskon: ili rektmetode instruis al la samgrupanoj gramatikaĵojn.

A. Cseh kutimis diri, ke li gvidis "konversaciojn", ne "kursojn". Mi opinias, ke ankaŭ Atilio majstre faris tion: tenante la fadenojn de la konversacio en la manoj, li kreis laboreman kaj samtempe amikeman atmosferon, kiu regis ne nur dum la lecionoj, sed ankaŭ dum la vesperoj, en la geamika rondo, en marborda restoracio.

Ginta Uittenbogaard-Liatukaitė, Nederlando

P.S. IEI okazigos inter la 7-a kaj la 9-a de marto 2003 seminarion pri E-Literaturo en la urbo Den Haag. Ĝi estas ero de la novaj programoj de IEI por pretigi E-instruistojn. Pliaj informoj: IEI, Riouwstraat 172, NL-2585 HW Den Haag, Nederlando; telefono +31 70 355 66 77, fakso +31 70 358 4422 kaj rete: <iei001@tiscali.nl>

Pollando

Esperanto en Politekniko

En Politekniko Lublina oni instruas Esperanton ekde 5 jaroj. Ĝi estas unu el la kvar elekteblaj lingvoj, kaj ĉ. 30 %-oj de la studentoj elektas E-on. En 2002 ekstudis E-on ĉ. 40 studentoj (du grupoj). La studado daŭros du semestrojn, 30 horoj po semestre. La unua instruisto estis Jaroslav Fotyga, poste dr Marczak, kaj nun Tomasz Chmielik.

Mi enkondukis E-on, kiam mi estis vicdekano por studentaj aferoj en la Fakultato de Civila kaj Sanitara Inĝinierii.

*prof. Witold Stepniewski, vicrektoro de Lublina Politekniko
<stepw@fenix.pol.lublin.pl>*

Rumanio

AIS-kurso en Sibiu

Kadre de la internacia kaj internacilingva katedro pri informadiko, kiun estras AIS-senatano Prof. Quednau, en la "Universitato Lucian Blaga" en Sibiu (Hermannstadt), la 14-an kaj 15-an de decembro 2002 okazis gastdocenta kurso enkondukita al datenprilaborado kaj Interreto. Estis prezentitaj 12 lecionoj en du tagoj fare de Reinhard Fössmeier, ano de la menciita katedro, el Munkeno (Germanio). La kurso okazis Esperante; la komenca parto estis ripetita en la germana lingvo por tiuj, kiuj ne komprenas E-on.

Kvardeko da studentoj oferis sian liberan semajnfino por partopreni, kaj duono el ili submetiĝis al fina ekzameno, en kiu la plimulto sukcesis kun bonaj aŭ tre bonaj rezultoj. Partoj de la kurso estas disponeblaj en la retpaĝaro de AIS (<http://www.ais-sanmarino.org/kursoj/>).

Laŭ informoj de Don Harlow

Rusio

Miloj da personoj komencis lerni Esperanton

Ĉi-aŭtuno estos por la rusia reta E-instruado rikoltodona kiel neniam antaŭe. Ĉiuj retaj E-kursoj estas amasaj kaj la nombro de tiuj kursoj iĝis pli granda.

Nu, unue pri la malnovaj kursoj ĉe „subscribe.ru”, kie daŭre funkcias du retaj E-kursoj: "Ŝkola Esperanto" nun gvidata de krimea aktivulo Mevo, kiu mem lernis Esperanton per kompaktdisko "Izuĉajem esperanto" – li havas ĉ. 1400 lernantojn. La dua kurso nomiĝas "Intensivnyj kurs esperanto" kaj ĝin partoprenas simile, iom pli ol 1400 membroj. Krome, en la sama „subscribe.ru” funkcias la plej malnova rusia ruslingva dissendolisto pri Esperanto "Novosti esperanto-dviĝenija". Nun ĝin gvidas Slavik Ivanov (Vladikavkaz/Sankt-Peterburg), kiu mem lernis E-on memstare per lernilo trovita en biblioteko. En lia dissendolisto membras momente 1431 personoj, kiuj ricevas interesajn informojn pri E-o kaj samtempe havas etajn lecionojn pri la lingvo.

Do, entute en subscribe.ru en E-dissendolistoj anas 4200 personoj, sed konsiderante, ke iuj abonas ambaŭ studajn listojn kaj ke "Novosti" estas legata ne nur de tiuj, kiuj lernas E-on, la kvanto de E-kursoj verŝajne estas ĉ. 2.5-3 mil.

Kaj preskaŭ tiom estas la partoprenantoj de "Oznakomitelnyj kurs esperanto" en servilo 'maillist.ru' – ĉ. 2530. La kvanto de la aliĝantoj tie relative rapide kreskas – ĉiutage aliĝas 15-20 personoj. La kurso aperis antaŭ unu jaro, ĝin, same kiel "Intensivnyj kurs" en 'subscribe.ru', gvidas mi.

Antaŭnelonge mi kreis plian retan E-kurson en la plej nova dissendolista retejo 'content.mail.ru'. La kurso nomiĝas "Esperanto. Kurs dlja mejdunarodnogo obŝĉenija".

Sume en la tri menciitaj retservoj nun E-on studas 5-6 mil personoj. Al tiu nombro necesas aldoni 250 personojn, partoprenantajn la plej efikan ruslingvan retan kurson, 'esperanto-kurso@yahoogroups.com' kaj preskaŭ tiom en 'rus-esper-instru@yahoogroups.com'. Ne malbone, ĉu?

Andrej Grigorjevskij, <andreo@esperanto.msx.ru>

Katedro de Esperanto en Mahaĉkala

Ekde septembro 2002 en la Kaukazia Laika Instituto (Mahaĉkala, Respubliko Dagestan, Rusio) oficiale funkcias Katedro de la internacia lingvo Esperanto. La estro estas Abdurahman Junusov. Studas E-on studentoj el fakultatoj: metiarto-projekta, religioscia, komputila k.a. Estas tre dezirataj kaj bonvenaj kuraĝigaj leteroj, informoj ktp.

Adr.: Ab/k 74, RU-367000 Mahaĉkala, Resp. Dagestan, Rusio; tel.: +7-8722-630643; fakso: +7-8722-630643

Abdurahman Junusov, <junusov@dagestan.ru>

el nia por via LERNILOTEKO...

Sylvain Lelarge:

Faru kion mi diras (sed ne kion mi faras)!

- ☞ *Manĝu la supon !*
- ☞ *Ne metu la piedon sur la tablon !*
- ☞ *Purigu vian nazon !*
- ☞ *Lavu viajn manojn !*
- ☞ *Ne interrompu la plenkreskulojn !*

- ☞ *Respondu per du vortoj!*
- ☞ *Tuj foriru el mia vido!*
- ☞ *Rapide venu!*
- ☞ *Fermu la pordon!*
- ☞ *Ne kriaĉu al la kato!*
- ☞ *Ordigu vian ĉambron!*
- ☞ *Lavu la telerojn!*
- ☞ *Demetu viajn ŝuojn!*
- ☞ *Ne metu ĉien viajn aĵojn!*
- ☞ *Ne ĉiam malfruiĝu!*
- ☞ *Venu hejmen!*
- ☞ *Ĝentile salutigu la sinjorinon!*
- ☞ *Mallaŭtigu la muzikon!*
- ☞ *Ne ludu per manĝaĵoj!*
- ☞ *Kunportu naztukon!*
- ☞ *Purigu viajn manojn!*
- ☞ *Atentu trapasante la straton!*
- ☞ *Lernu la lecionon!*
- ☞ *Faru la hejmtaskojn!*
- ☞ *Aŭskultu al mi!*
- ☞ *Obeu la patron!*



Kiel mi uzas la materialon *Faru kion mi diras?*

- 1) Unue mi klarigas ke en ĉiu kulturo la gepatroj opinias sian devon eduki la infanojn, ofte pere de riproĉecaj komandoj. Kiujn tiajn rememoras la partoprenantoj el la propra infanaĝo? La listo plilongigas kaj spegulas iliajn travivaĵojn, dum ekestas bonhumora etoso kaj reciproka agnosko.
- 2) Poste mi pretendas esti en ne tro ŝika apartementaro, en kiu tre facile aŭdeblas la vesperaj kvereloj de la najbaraj familioj. Mi parigas la partoprenantojn, donante al ĉiu paro familinomon, kaj infanon sub la formo de stranga pupaĵo staranta surplanke vid-alvide al ili.

- 3) Sekve mi rimarkigas ke fakte neniel temas pri edukado de la infanoj (kiuj neniam tiel edukiĝas), sed de povlukto inter la gepatroj. Tiu kiu havas la lastan vorton venkas. Do jen teatra konkurso inter la paranoj. Tiu fantazia kadro plifaciligas la laŭvoĉan esprimadon, kiu gravas en lingvolernado.
- 4) Por prepari la konkurson, mi ripetigas la tutan liston, ofte komikmimante la malpermesaĵojn kaj tiel forprenante la lastajn barojn. Mi faras tion kun partnero, kvazaŭ ni mem konkursus. Mi aldonas variaĵojn al la listigitaj frazoj (ekzemple: 'ordigu mian ĉambron'), kiu senfinigas la eblojn.
- 5) La nuraj reguloj dum la konkurso estas ke oni ne rajtas uzi la liston laŭsekve, nek ripeti ion jam diritan. Mi, laŭ la nivelo de la grupanoj, sugestas uzi la liston aŭ la memoron. Ekde kiam la konkurso komenciĝas, ekestas energiplena bruhaoso, kio faras ke oni multfoje kaj multflanke aŭdas frazojn, ofte komikajn, kio stimulas la imagpovon. Mi mem kriripetas al mia partnero la (korektitajn) frazojn kiujn mi plukis el la bruego, kio estas sufiĉe efika nedirekta korektado.
- 6) Kiam la energio komenciĝas malaltiĝi, tuj mi ĉesas kaj iras al alia – 'logike sekvinda' – trankvila aktivaĵo.

Fonto: < <http://www.edukado.net> >

Kvazaŭ-nekrologe pri Zsuzsa Csiszár (1951-2002)

Aparta estis Zsuzsa Csiszár kaj aparta estas ŝia edzo Ernő. Ĉi tiu paro havis brilan ideon kaj ilia ideo estis tiom brila, ke ĝi ankoraŭ estas sekvata, kiam ili du ne plu okupiĝas pri ĝi.

La geedzoj Csiszár estis ambaŭ instruistoj, sed krome ili amis infanojn, ne nur siajn. Tie kuŝas la sekreto de la Renkontiĝoj por Esperantlingvaj Familioj, REF, tra kiuj ĝoje pasis generacioj de infanoj dum la lastaj jardekoj.

La ideo estis simpla: ni aranĝu feston por niaj infanoj kaj iliaj geamikoj de amikaj familioj. Temas pri io normala en la mondo, sed neniu ĝis ilia ekagado pensis stabiligi serion de renkontiĝoj por esperantlingvaj infanoj kaj gepatroj surbaze de tiu principo. La REF-oj



sukcesis, ĉar temis pri elektitaj familioj, kiuj pretis doni sian atenton al infanoj kaj kunagi kun ili. Temis pri koncepto male mala je tiu de, ekzemple, la Infanaj Kongresetoj dum la Universalaj Kongresoj, en kiuj infanoj restas solaj dum gepatroj estas en la UK.

Zsuzsa estis patrino tre amanta, kiu kapablis disradii sian amon al ĉiuj, kaj kapablis agrabligi la restadon de la fremdaj familioj helpante pri ĉio, de la kuirado al la mastrumado ĝenerala al, fine, la agado kun infanoj. Almenaŭ mi mem neniam povos forgesi kiom lerte ŝi gvidis la kantadon de infanaj kantetoj fare de infanoj kaj gepatroj.

Mi havas ankaŭ multajn aliajn memoraĵojn pri ŝia agado dum la REF-oj, pri ŝia helpo al la infanoj desegni, pri ŝia gvidado de ekskursoj, ktp.

Mi kredas, ke ĉiuj, kiuj pasis tra REF-oj, restis komplete ŝokitaj, kiel mi estis, pro la informo pri ŝia morto en juna aĝo.

Vivos tre longe la memoro pri tio, kion ŝi kaj ŝia edzo kapablis konstrui en la kampo de edukado de infanoj.

Al la edzo kaj al la filinoj iras nia profunda kaj malĝoja sento de kundoloro. Bedaŭrinde ni ne povas fari ion plian.

Renato Corsetti, <renato.corsetti@uniroma1.it>

pri aranĝoj ...

1) Nord-Amerika Somera Kursaro de Esperanto

La tri-semajna Nord-Amerika Somera Kursaro de Esperanto (NASK) estas la plej longa intensa E-kursaro en la mondo. Fondita de ges-roj Bill kaj Cathy Schulze en 1970, ĝi sukcesis 32 somerojn en Kalifornio, antaŭ ol translokiĝi en 2002 al la nordorienta ŝtato Vermonto, responde al invito de supera lernejo "School for International Training" (SIT). Ĉi ties celokupo dum kelkaj jardekoj estas lingva kaj interkultura trejnado, aparte por homoj kiuj pretigas sin por vivi kaj efike labori en alikultura medio. Ĝiaj someraj studentoj ne nur venas el multaj landoj sed ankaŭ havas aktivan interesiĝon pri lingvoj kaj kulturoj. Tiu internacia kaj similcela etoso tre taŭgas por Esperanto-studoj, kaj NASK facile hejmiĝas en ĝi.

La "nova" NASK, do, disvolviĝas en pli intima kaj samtempe pli stimula homa medio, nun en belega montetaro apud la urbeto Brattleboro. La tuto konvenas al ĝuindaj studado, interparolado, kunlaborado, kaj amuziĝo por NASKanoj de minimume 4 kontinentoj. La programo inkluzivas intensajn kursojn je post-baza, meza, kaj supera niveloj. Ne nur la lecionoj sed ankaŭ la kromaj diskutoj, la kulturaj kaj distraj programoj, kaj la ekskursoj estas Esperant-lingvaj.

En 2003, NASK okazos inter la 7a kaj la 25a de julio. Instruos Spomenka STIMEC, Paul GUBBINS, kaj Lee MILLER. Detalaj informoj pri la kursaro kaj stipendioj haveblas ĉe retadreso <<http://www.esperanto-usa/nask>> aŭ de la administrantino Ellen EDDY <eddyellen@aol.com> (11736 Scott Creek Drive SW, Olympia, WA 98512 USA).



*Partoprenantoj de NASK-2002 ĝoje atendas
inaŭguran kursaron en nova medio*

2) Somera Esperanto-Lernejo

Ĉaĉak, 2003.06.22–29

Balkana Komisiono de UEA,
Esperanto-Instituto Beograd



PROGRAMO

- **Metodika seminario** kun teoriaj prelegoj, laborgrupoj, diskutrondoj kaj provlecionoj
- **E-kursoj:** komenca kaj daŭriga
- **Kultura programo**

SELĈ 2003 – ALIĜILO

Plena nomo: _____
Lando _____ Urbo _____
Adreso _____
Retadreso _____
Mi loĝos en amasloĝejo / hotelo (forstreku la nenecesan).
Mi aliĝas al (elektu unu) ____ (A: Metodika seminario, B: komenca E-kurso, C: daŭriga E-kurso)
Mi pagos kotizon de _____ EUR minus eventuala rabato.
Mi antaŭpagis la sumon de _____ EUR al _____
Mi konsentas, ke la antaŭpago ne repageblas kaze de malaliĝo.
Mi venas sola / gvidas ____-membran grupon. (forstreku la nenecesan)
Dato: _____ Subskribo _____

KOTIZO

La kotizo inkluzivas partoprenon en elektita seminario/kurso kaj loĝigon kun tri manĝoj tage por la tuta periodo ekde vespermanĝo 2003.06.22 ĝis la tagmanĝo 2003.06.29

Kotizo kun loĝado en la amasloĝejo:

- 85 EUR por B-landoj (ekssoc. landoj, B-landoj el la kotiztabelo de UEA)
- 110 EUR por A-landoj

Kotizo kun loĝado en hotelo: 220 EUR

Pagoj: ĉe la alveno

Antaŭpagoj: al la konto de ILEI ĉe UEA **ilek-a** kun nepra indiko "por Ĉaĉak 2003"

RABATOJ

- **Por fruaj aliĝoj kun parta antaŭpago** de 20 EUR por B-landoj / 40 EUR por A-landoj: 25% ĝis 2003.03.31; 10% ĝis 2003.05.15
- **Por ĉiu kiu venigos grupon de kursanoj:** 5% oble nombro de la grupanoj Aliĝilojn bonvolu sendi rete al: **radp@ptt.yu** aŭ paperpoŝte al: **Dom uĉenika** (por Esperanto-Lernejo) Uĉiteljska 8, YU-32 000 Ĉaĉak, Serbio

3) 36-a ILEI-konferenco en Örestrand, Svedio

Aliĝkotizoj

A- kaj B-landoj same kiel ĉe UEA. La prezoj estas indikitaj en EUR.
La kotizo ne inkluzivas loĝadon, manĝon kaj ekskurson.

Periodoj	ĝis 03-1-31	ĝis 03-4-30	ekde 03-5-1
<i>Kategorioj</i>	<i>A/B</i>	<i>A/B</i>	<i>A/B</i>
1. Membro	30/20	40/30	50/35
2. Ne-anoj	40/25	50/35	55/40
3. Junulo/handikapulo	20/15	30/25	40/35

A. Loĝado (1 persono kaj 1 nokto)

- 1) Aneksaĵo -a (kun necesejo) 2-litaj: 42 EUR (kategorio - a)
- 2) Aneksaĵo -b (necesejo koridore) 2-litaj: 35 EUR (b)
- 3) Dometoj (sen necesejo) 4 litaj: 29 EUR (c)
- 4) Pavilono (sen necesejo) 4 litaj: 23 EUR (ĉ)

- * Mi mendas loĝadon en kategorio ... ekde la ...-a ĝis la ...-a de aŭgusto.
- * Mi deziras loĝi kune kun, (nomo kaj lando).

B. Manĝoj

- 1) Kiel pakaĵo dum la tuta Konferenco, 3 manĝoj tage: 121 EUR (d)
- * Krom ekskursita tago.
 - 2) Se oni mendas manĝojn aparte: unu matenmanĝo: 5 EUR, unu tagmanĝo: 9 EUR, unu vespermanĝo: 14 EUR
 - * Mi estas vegetarano: jes (), ne ()

C. Ekskurso ĉirkaŭ Sundo.....40 EUR (e)

Ne komuna buso, sed la plej moderna trajno kun komforto. Personoj, kiuj havas problemon promeni kaj moviĝi tutan tagon, bv. ne partopreni ĉi tiun ekskurson. Tagmanĝon oni mem aranĝas.

D. Transporto (de Gotenburgo al KF-ejo) nur tien (f)

- * Ankoraŭ ne decidita, kaj dependas de la aliĝ-nombro. Informo aperos poste

Mendilo de la 36-a ILEI-Konferenco

(Bonvolu skribi pres-literere. Valuto en EUR!)

Familia nomo _____
Persona nomo _____
Naskiĝdato: / / (jaro/monato/tago) Sekso: viro/- ino
Profesio: _____ Hobio: _____
Adreso: _____
Poŝtkodo _____ Urbo _____
Lando _____ Tel: _____
Fakso: _____ Reto: _____
Mi pagas konferenc-kotizon al _____ sume _____ EUR.
Mi komprenas kaj akceptas la kondiĉojn presitajn en tiu ĉi mendilo.
Subskribo: _____ Dato: ____/____/____
Aliĝkotizo _____ EUR
Donacoj al ILEI _____ EUR
Infankongresa kaso _____ EUR Loĝado _____ EUR
Eldona kaso _____ EUR Manĝoj _____ EUR
Dazzini kaso _____ EUR Ekskurso _____ EUR
Koleghelpa kaso _____ EUR Transporto _____ EUR
Interkulturo _____ EUR
Bankkosto _____ EUR
Sumo _____ EUR

* Pagmanieroj: al Poŝtĝirkonto 682117-7, ILEI c/o Boomee Kim-Lindblom, kasisto, Stenbockens gata 102, SE-136 62 Haninge, Svedio

* Bonvolu aldoni 8 EUR-ojn por bankkosto aŭ al ILEI-konto 'ilek-a' ĉe UEA (sen bankkosto).

* Bonvolu nepre sendi la subskribitan mendilon kun pago al la kasisto de ILEI.

redaktora postnoto

La nunan numeron – krom nia vicredaktorino – provlegis Sophia Mensen (NL) kaj Luiza Oberrauch Madella (IT). Dankon al ili!

La renovigitan paĝaron de IPR (www.nl-papa.hu/ipr/) en la unua monato vizitis pli ol 300 gastoj.

Internacia Pedagogia Revuo aperis ankaŭ en la paĝaro de edukado.net. Vizitu: <http://www.edukado.net> kaj tie la KATALOGOn. (J.N.)

LABORKOMISIONOJ

Ekzamena: Duncan Charters (prezidanto), Bill Maxey (sekretario) ✉: bmaxey@visi.net

Elekta: Gwenda Sutton (kunvokanto), Maritza Gutierrez, Joseph Catil

Kontrolo: Bertil Andreasson, Lars Forsman

Lerneja: Marija Belošević, Jennifer Bishop, Renato Corsetti, Stefan MacGill, Géza Kurucz, Maŭro La Torre, Raita Pyhälä

Regulara: Rob Moerbeek, Hans ten Hagen

Terminara: Maŭro La Torre

KUNLABORANTAJ INSTITUCIOJ

FIPLV (Internacia Federacio por Instruistoj de Modernaj Lingvoj)

Reprezentanto de ILEI: **Jennifer Bishop** ✉: esperanto@Education.monash.edu.au

IEI: Internacia Esperanto-Instituto, Riouwstraat 172, NL-2585 HW Den Haag, Nederlando.

UEA: Universala Esperanto-Asocio, Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ Rotterdam, Nederlando. Reprezentanto de ILEI: **Maŭro La Torre**; estrarano de UEA pri edukado: **Gbeglo Koffi**.

UNESKO (en operaciaj rilatoj). Reprezentantoj de ILEI: **Renée Triolle**, Bello Bauco, Chemin de la Civade Verte, FR-13600, La Ciotat, Francio; **Jean-Pierre Boulet**, 17 Av. de la Dordogne, FR-63800 Courmon d'Auvergne, Francio, tel. (+33) 4 73 84 90 60; **Mireille Grosjean**, Temple 20 pf. 9, CH-2416 Les Brenets, Svislando, tel.+fakso (+41 32) 932 18 88, ✉: mireille.grosjean@rpn.ch

MEMBRIĜO AL ILEI KAJ PAGADO POR ALIAJ SERVOJ

ILEI estas jure registrita ĉe la komerca ĉambro en Den Haag sub numero 27.181.064.

La membreco inkluzivas ricevon de 4 numeroj de IPR jare. Turnu vin al via landa sekcio, kiu fiksos kotizon en via propra valuto. Por pagi rekte al la internacia ILEI, skribu al la kasisto: *Boo Mee Kim-Lindblom, Stenbockens gata 102, SE-136 62 Haninge; tel. (+46 8) 777 4175, ✉: boomee.kimlindblom@swipnet.se. Postĝirkonto: 682117-7, Stokholmo. S.W.I.F.T. - kodo: PGSISESS.* Membro-kotizoj: A-landoj (laŭ UEA-divido): 14 EUR, B-landoj: 8 EUR. Simpla abono sen membreco: 18 EUR. Pro altaj banko-kostoj, evitu bankĉekojn kaj eĉ internaciajn poŝtoĝirojn; taŭge plenumita Euroĉeko plej bonas. Alia pagmaniero estas al UEA: *UEA, Nwe. Binnenweg 176, 3015 BJ Rotterdam, pĝk 37 89 64.* UEA akceptas kredit-kartajn pagojn. Klare indiku la celon de la pago. Kontoj ĉe UEA: ilek-a (ĝenerala), juna-l (Juna amiko) kaj pike-b (Projekto Interkulturo). Detala listigo de pagmanieroj al UEA aperas sur p. 32. de Jarlibro 2002. Prefere informu senpere la kasiston de ILEI pri la enpago.

Reklamtarifoj por IPR: 180 EUR por plena, 110 EUR por duona kaj 70 por kvarona paĝoj. Tio inkluzivas bazan grafikan pretigon; kostojn de ekstra pretigo oni rajtas fakturi. Sekcioj reklamante edukajn projektojn rajtas peti trionan rabaton.

Hejmpaĝo de ILEI ĉe: <http://il.uniroma3.it/ilei>

REDAKCIAJ INFORMOJ

Respondeca eldonanto (verantw. uitgever): R. Wylleman, A. Vermeylenstr. 65, BE-8400 Oostende. **Presado:** Flandra Esperanto Ligo, Frankrijklei 140, BE-2000 Antwerpen, Tel: +32-3-234 34 00. **Redaktejo:** NÉMETH József, HU-8531 IHÁSZ, Fő u. 41/5. Rete: www.nl-papa.hu/ipr/; jozefo@nl-papa.hu; [jнем@uea.org](mailto:jnem@uea.org), tel/fakso: +36-89/ 356-050.

Vicredaktorino: katalin@ikso.net. La revuo aperas ankaŭ kasete registrita por leghandikapuloj. Informas: Rob Moerbeek, Zwaansmeerstraat 48, NL-1946 AE Beverwijk.

La nunan numeron ni sendis al la presejo la 17-an de januaro 2003,

redaktfino por la sekva numero: la 15-a de aprilo 2003.

SEKCIESTROJ

Albanio: Vasil Pistoli, c/o Bardhyl Selimi, Rr. Maliq Muco, Pall. 50, ap. 3, AL-Tirana ✉: selimib@albmail.com

Argentino: Teresita Alaniz, El Ombú s/n, AR-5801 Alpa Corral

Aŭstralio: Kay Andersen, P.O. Box 186, Moorooka AU-4105 ✉: kjand@ozemail.com.au

Belgio: Raymond Wylleman, A. Vermeylenstr. 65, BE-8400 Oostende ✉: raymond.wylleman@pi.be

Brazilio: Elvira Fontes, Rua Machado de Assis 243, ap. 11, BR-04106-010 Sao Paulo (SP)

Britio: Grahame Leon-Smith, The Niven Suite, The Mansion, Ottershaw Park, Surrey, KT16 0QG. ✉: grahame.leon-smith@free-computers.org

Ĉeĥio: Jana Melichárková, CZ-696 02 Ratíškovice 938 ✉: melicharkova@quick.cz

Ĉinio: Zhang Danchen, General Foreign Languages Dept., 29-34 North Part, Huazhong Normal University, CN-430070 Wuhan ✉: zdchen@public.wh.hn.cn

Finnlando: Carola Antskog, Dragsfjärdvägen 690, FI-25700 Kimito ✉: cantskog@kolumbus.fi

Francio: Joseph Catil, 5, rue des Calabres, FR-69330 Meyzieu, ✉: joseph.catil@wanadoo.fr

Germanio: Michael J. Scherm, Von Thürheimstr. 47, DE-89264 Weissenhorn

Hungario: József Németh, Fő u. 41/5, HU-8531 Iháász ✉: jozefo@nl-papa.hu

Irano: Hamzeh Šafii, P.O. kesto 17765-184, IR-Teheran ✉: ilei.ir@esperanto.org

Italio: Luigia Oberrauch Madella, via Prampolini 8, IT-43100 Parma

✉: pianetaurano@libero.it
Japanio: Masumi Suzuki, Inokashira 3-5-12, Mitaka-shi, Tokio, JP-181-0001 ✉: masumi-s@gw3.gateway.ne.jp

Katalunio: Luz Vázquez, Apartat 553, ES-43200 Reus ✉: ileicat@hotmail.com

Kroatio/KEL: Anicka Jaghić, Stubička 75, HR-10000 Zagreb, ✉: anicka.jagnjic@zg.tel.hr

Kroatio/KEU: Ivan Bekavac-Basić, Kušlanova 59, HR-10000 Zagreb

Kubo: Pedro Fernández Rodríguez, Requena No. 17 apto. 1 entre S.Allende y Lugareño, Plaza, CU-10600 Ciudad de la Habana, ✉: kubesp@ip.etecsa.cu

Nederlando: Atilio Orellana Rojas, Riouwstraat 172, NL-2585 HW Den Haag, ✉: iei001@tiscali.nl

Norvegio: Björn Thuv, I.F. Gjerdrums vei 33 NO-1396 Billingstad ✉: bthuv@c2i.net

Pollando: Maria Majerczak, ul. Armii Krajowej 7, m. 122, PL-30 150 Krakow, ☎: (+ 48 12) 638 14 49

Rumanio: Popa Florica, Str. Eroilor 29, ap.7. RO-1900 Timisoara

Rusio: Irina Gončarova, Moloeznaja 38-10, Odincovo 2, Mosk. obl. RU-143000 ✉: mirina@online.ru

Svedio: Bertil Andreasson, Södra Rörum pl. 455, SE-24294 Hörby ✉: bertil.andreasson@horby.mail.telia.com

Svislando: Mirelle Grosjean, Grand-rue 9, Pf. 9, CH-2416 Les Brenets ✉: mireille.grosjean@rpn.ch

Togolando: Attiogbe-Agbemadon B., Mensah, T. I. E. To, B.P. 13169, Lome-TOGO, ✉: esp.togo@cafe.ig

Usono: Doroteo Holland, 5140 San Lorenzo Dr, Santa Barbara, CA 93111-2521 (US) ✉: dorothyh@west.net

REPREZENTANTOJ

Armenio: Lida Elbakjan, Moldovakan 26/2, kv. 52, AM-375062 Erevan ✉: LIDELB@freenet.am

Bosnio kaj Hercegovino: Nimeta Kulenović, Branica Sarajeva 15/V, BA-71000 Sarajeva

Ĉilio: Héctor Campos Grez, Casilla 231, Curicó, CL-Séptima Región ✉: strigo@ctcreuna.cl

Estonio: Helgi Hromova, Pk. 623, EE-12602 Tallinn

Islando: Loftur Melberg Sigurjónsson, Traðarberg 13, IS-221 Hafnarfjörður, ✉: loftur@skyr.is

Israelo: Gian Piero Savio, P.O.K.386, IL-84965 Omer ✉: javiosh@netvision.net.il

Jugoslavio: Radojica Petrović, Bul. oslobođenja 36, YU-32000 Čačak ✉: radp@ptt.yu

Kongo DR: Ngangu Nduantoni-Bakidila, B.P. 13, CD-Lukala (Bas-Zaire)

Korea Resp.: CHO Sung Ho, Department of Biology, Inha Universitato, Incheon 402-751, Koreio ✉: shcho@inha.ac.kr

Kostariko: Hugo Mora Poltronieri, Apartado 4981, CR-1000 San José ✉: miaumiaul@racsa.co.cr

Litovio: Algimantas Piliponis, Karolinisiu 3-93, LT-2044 Vilnius ✉: piliponis@centras.lt

Nov-Zelando: Gwenda Sutton, 12C Herbert Gardens, 186 The Terrace, NZ-6001 Wellington 1 ✉: gwenda.s@ihug.co.nz

Portugalio: João José Santos Rua Damasceno Monteiro, 21-B r/c dto.PT-1170-109 Lisboa ✉: mqsantos@hotmail.com

Slovenio: Marija Zlatnar-Moe, Miličinskega 66, SI-1000 Ljubljana. ✉: Marija.Zlatnar@guest.arnes.si

Ukrainio: Nina Daniljuk, prosp.ek Sobornosti, 32-108, Luck-26, UA-43026

Uzbekistano: Eugenio S. Perevertajlo, Ab. kesto 140, UZ-700000 Taškent, CIS ✉: eugeniy@esper.gimli.com

Venezuelo: Andrés Turrisi, Cen.Res.Puerta del Este.Torre, Oeste, piso15, ap.153, Av.Madrid, VE-1070 La California Norte, Caracas ✉: andesp@internet.ve